

KOLEKTO DE FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO

PEDAGOGIA SERIO : N° 3

GVIDLIBRO

**por la ekzamenoj de
F E I**

2-a eldono kompletigita kaj ĝisdatigita

1966

FRANCA ESPERANTO - INSTITUTO

Direktoro de la ekzamenoj :

**P. TARDIEU
31, rue Trébois - 92-Levallois-Perret
C.C.P. 551-76 Paris**

ANTAŬPAROLO

« Ĉiuj, kiuj okupiĝis pri ekzamenoj, scias, ke la plej malfacila afero estas egaligi la nivelon de la provoj ĉe ĉiuj kunsidoj kaj samigi la juĝmanieron de ekzamenantaroj sidantaj en malproksimaj lokoj. Tiu malfacilo, jam rimarkebla ĉe oficialaj ekzamenoj, estas ankoraŭ pli grava, kiam temas pri ekzamenoj organizitaj de privata instanco helpe de neprofesiaj juĝantoj... Por permesi al ĉiuj instruistoj taŭge prepari siajn lernantojn, mi opiniis utila la publikigon de kolekto da tipaj tekstoj, kiuj montru al ili la nivelon de la koncerna ekzameno »

Tiuj linioj el la antaŭparolo al la unua eldono de ĉi tiu libreto sufiĉe klarigas ĝian celon ; ŝajnas, ke ĝi efektive respondis al vera bezono, ĉar ĝi rapide elĉerpiĝis, kaj de tiam multiĝis petoj pri reeldono. Jen ĝi, finfine. La nuna Prezidanto de F.E.I. : mia kolego Duc Goninaz, la Sekretario de la Esperanta Akademio : Roger Bernard, George Lagrange kaj Jean Thierry, membroj de F.E.I., bonvolis, ĉe tiu okazo, kompletigi kaj ĝisdatigi mian verketon, modernigante la elekton de la modelaj tekstoj, aldonante utilajn detalojn pri la du unuaj ekzamenoj kaj informante pri la lasta kaj plej alta, la Diplomo pri Altaj Esperantaj Studoj. Sub tiu nova formo povu ĉi tiu Gvidlibro plu plenumi sian rolon kaj konduki la uzontojn al pli ĝusta kaj profunda sciado de nia belega lingvo.

Vitry, la 7-IV-1966,
G. WARINGHIEN.

ATESTO PRI LERNADO

Tiu unua ekzameno, kvankam tre simpla, devas esti serioze plenumata.

La skriba parto konsistas en la traduko esperanten de 10 frazoj, diktitaj aŭ tajpitaj en franca lingvo. La kandidato disponas 1 horon, sed neniun libron.

La ekzamenanto povas ricevi de la Ekzamena Centro la koncernajn frazojn, aŭ ilin mem elekti, ekz. el la uzita lernolibro. En ili kuŝu almenaŭ unu ekzemplo el ĉiu el jenaj malfaciloj: akuzativo de almovo, distingo inter *tio* kaj *tiu*, *li* kaj *ĝi*, *pli* kaj *plej*, *ke* kaj *kiam*, *ĉu* kaj *se*, sed ĉio tio estas en simplaj klaraj frazoj. La provo estas notota de 0 ĝis 10 : oni nepre deprenu minimume 1/2 de poento ĉe la pli gravaj gramatikaj eraroj kaj 1/4 de poento ĉe la malpli gravaj eraroj. Se la kandidato ne ricevas 5 el 10, li malsukcesas.

La parola parto konsistas el lego kaj traduko de facila anekdoto, kiu devas esti ĉirkaŭe 10 liniojn longa. Taŭgan materialon oni trovas en *Facilaj Esperantaj legaĵoj*, de G. Waringhien (elĉerpita) *Novaj Esperanto-historietoj* (Danks Esperanto-Forlag, 2-a eld. 1956) aŭ en diversaj revuoj, kiel *La Praktiko*.

Oni notas la provon de 0 ĝis 10, aljuĝante 4 poentojn al la prononco, 3 al la traduko kaj 3 al la respondoj al elementaj gramatikaj demandoj, kiuj povas tuŝi la erarojn faritajn en la skriba parto. Ni memorigas, ke la Atesto pri Lernado estas necese postulata de ĉiu kandidato al unu el la sekvantaj ekzamenoj.

Ekzemploj de elementaj gramatikaj demandoj :

— Quelles sortes de mots peuvent prendre l' « n » accusatif ? Exemples.

— S'il y a déjà dans la phrase un autre mot de sens négatif, mettez-vous encore « ne » en espéranto ?

Traduisez : Personne ne pense. Je n'ai jamais vu personne. Sans l'aide de personne.

— Indiquez, avec exemples et traductions, les douze terminaisons caractéristiques du verbe.

Ekzemploj de tradukotaj frazoj (1) :

— Ce livre est plus intéressant que tous les autres.

— Votre fille est moins âgée que mes garçons, mais elle est la plus raisonnable.

— Il est nécessaire de blanchir les murs de cette maison.

— Si votre sœur veut prêter son livre, je suis sûr que nous le lirons.

— Cette porte est fermée, ouvrez-la.

— Je pense que le livre que vous avez acheté est très intéressant.

— Je ne sais pas encore si nous irons nous promener malgré la pluie.

— La boulangère dit que ses gâteaux sont bons.

— Plus on lit, plus on veut lire.

— Je ne connais pas cet enfant qui entre dans la maison.

— Si vous venez dimanche prochain, nous irons nous promener dans la forêt.

— On coupe sa viande avec un couteau.

— Il n'est pas si intelligent qu'il le paraît.

— Il est très facile d'apprendre l'espéranto.

— Il vient de sortir, mais il va revenir tout de suite.

— Elle était en train de lire quand il se mit à pleuvoir.

— Avez-vous l'intention d'aller jusqu'au bout ?

- Une mouche est tombée dans l'encrier.
- Ne promenez pas votre chien dans le jardin public.
- Le mari de mon amie se demande s'il pourra aller avec vous.
- Garçon ! Donnez à ma fille son manteau !

NOTO: Por informiĝi pri la kondiĉoj de la ekzamenoj, oni petu de Unuiĝo Franca por Esperanto aŭ de S.AT. - Amikaro la «Règlement et Programme des Examens».

(1) Neniu el la ĉi-tieaj ekzemploj , nek el la postaj paĝoj, estu uzataj en ekzamenoj : ili estas kaj devas resti nur **ekzemploj**.

ATESTO PRI SUPERA LERNADO

SKRIBA PARTO

Ĝi konsistas el 2 provoj : traduko de peco de esperanta artikolo, notota de 0 ĝis 10, kaj verko de letero aŭ artikoleto, notota de 0 ĝis 20. La tuto daŭras 2 horojn. La sola helpilo permesata en la ekzameno estas la *Lexique Fondamental* de René Léger.

La kandidatoj atentu, ke la *traduko* devas esti antaŭ ĉio ekzakta kaj korekta : oni ne postulas de ili stilekzercon, sed pruvon, ke ili scipovas kompreni esperantan tekston kaj esprimi ties enhavon per gramatike senerara lingvo. La ekzamenontoj devos do aljuĝi la meznoton nur al taskoj, en kiuj ili trovos nek gravan miskomprenon, nek gravan solecismon. Ili atentu ankaŭ la ortografion, pro kiu, se ĝi estas malbona, ili povus depreni 2 aŭ 3 poentojn el 10.

La verko devas esti juĝata laŭ du vidpunktoj : enhavo kaj formo. Rilate la enhavon, oni postulas, ke la kandidatoj ne skribu purajn infanaĵojn aŭ ne evitu la malfacilaĵojn per troa mallongeco : en tiaj okazoj, oni povus depreni ĝis 5 aŭ 6 poentojn el la 20. Longo egala al tiu de la tradukpeco estas minimuma. La formo estas kompreneble la pli grava : tasko entenanta erarojn pri akuzativo, adverbforma participo, pri SI aŭ SIA, IG aŭ IĜ, SE aŭ ĈU ktp. ne devas atingi ĝis la meznoto. Por la cetero, oni zorgu antaŭ ĉio la klarecon kaj kompreneblecon.



1. — TRADUKO : Antaŭparolo

Enciklopedio de Esperanto kreiĝis el entuziasma, sindona laboro de esperantistoj el ĉiuj tendencoj, el senlaca, kelkjara laborado de ĝiaj redaktoroj kaj el entuziasma, pacienca helpemo de multaj centoj da simplaj esperantistoj-soldatoj. Tia laboro, la rezulto de tia laboro devas ŝveligi en nia brusto memfidon, fidelecon al movado, kiu havas malgraŭ sia juneco tiom ampleksan pasintecon. La legado pri la laboro de niaj unuaj pioniroj, la malfacilaĵoj de la laboro en la unuaj tempoj, la atingitaj rezultoj, kiujn ni povas ĝuste taksu nur post komparo de la tiama kaj nuna situacio, donas al ni forton por daŭrigi la komencitan vojon ĝis la triumfa venko.

El *Enciklopedio de Esperanto*.

VERKO

En formo de letero al amiko, rakontu, kiel kaj kial vi interesiĝis al Esperanto.



2. — TRADUKO : Memoraĵoj

Mia patro estis okulkuracisto. Dum multaj jaroj ĉiutage li kliniĝadis senlace super okuloj atakitaj de malsano aŭ kovritaj per la vualo de blindeco. Sed kiam finiĝis la horoj de konsultado, kiam la nokto envolvis la teron kaj fermis al dormo ĉiujn okulojn, vidantajn kaj blindajn, en la malgranda kabineto ĉe la strato Dzika komenciĝis alia laboro : la okulkuracisto laboris kaj batalis senlace, por ke malfermiĝu la blindaj okuloj de la homaro, por ke la vidantoj, ofte pli blindaj ol la blinduloj mem, trovu en si internan, spiritan vidon, per kiu oni rekonas fratan vizaĝon en la trajtoj de ĉiu homo.

El *Ligilo por Vidantoj*, de Lidja Zamenhof.

VERKO

Verku mallongan radio-paroladon okaze de la datreveno de la morto de Zamnehof.



3. — TRADUKO : Erasmo

La fama kaj eminenta scienculo kaj filozofo el Roterdamo kvazaŭ enkorpigis la tutan humanismon tiaman. Dum kvardek jaroj li ĝuis la plej grandan aŭtoritaton en tuta Eŭropo. Sed li ne verkis por la amaso, kiu cetere tiam estis analfabeta, sed por la instruituloj. Kaj li uzis *internacian* lingvon, la latinan, kiun konis kaj praktikis la kleruloj el tiu epoko. Cetere Erasmo vivis jen en Francio, jen en Anglio, en Italio, en Belgio kaj li mortis en Svisio.

Erasmo ja malaprobis ĉian perforton, ĉian fanatikon, li rekomendis liberon kaj toleremon. Precipe la militon li abomenis ...

El *Herezulo* (Aprilo 1936).

VERKO

Faru, por pasporto, la tre precizan priskribon de tri personoj, bone konataj de vi.



4. — TRADUKO : Recenzo pri la Revuo « Kemio internacia ».

...Krom la ĉefaj artikoloj la kajero enhavas tabelon de la atompezoj de la elementoj laŭ la karbona skalo kaj rubrikon « Tekniko, industrio, esploro nun en la mondo » kiu havas artikoletojn pri sciencaj konferencoj, kongresoj, kaj novaj teknikaj eventoj. Oni povas bedaŭri pri la manko de referaĵoj pri pure sciencaj novaĵoj. Al la libro estas

aldonitaj eltondeblaj slipoj por ĉiu artikolo ; ili estas certe tre utilaj, same kiel la nacilingvaj resumoj.

Do, prosperon al la novnaskito ! Ĝia sorto estas en la mano de esperantistoj-ĥemiistoj. Subtenu ilin per aĉetado, disvastigo kaj kontribuado !

B.V. Tokarev (el *Esperanto*, Decembro 1965)

NOTOJ. Referaĵo = raporto ; Kemio = Ĥemio

VERKO

Faru protokolon kiel atestanto de stratakcidento.



5. — TRADUKO : Junulargastejoj

En la danaj junulargastejoj la tranokta pago estas 2-3 danaj kronoj por lito kun du lankovriloj. Oni mem devas kunporti tolan dormsakon aŭ lui tian sakon en la J.G.— En ĉiu J.G. oni povas pasigi maksimume tri sinsekvajn noktojn. Antaŭsciigo pri alveno estas rekomendinda, precipe en la somera sezono. Oni povas aĉeti manĝaĵojn je malalta prezo en la J.G. Sed estas ankaŭ speciala kuirejo por la migrantoj, kie oni mem povas prepari sian nutraĵon. Tuj post alveno oni devas sin turni al la gvidanto de la J. G., kiu instruas pri la lito uzota ktp. Oni rajtas alveni per aŭtomobilo al la danaj J.G., kaj ofte estas specialaj « familiaj ĉambroj », kiuj tamen devas esti antaŭ-menditaj. En Danlando estas entute 114 J.G. kun entute 9.446 litoj.

Bonvenon al Danlando kaj al danaj J.G.

VERKO

Skribu cirkuleron al kelkaj kamaradoj, por proponi aranĝon de aŭtomobila vojaĝo al internacia kongreso aŭ renkontiĝo.

6. — TRADUKO : Kuracado per mielo.

... Estante studento, li malsaniĝis. Li suferis inflamon de la spirvojoj. Li devis interrompi la studadon. Tiam liaj gepatroj, aplikante popolan medicinon, komencis regule doni al li mielon. La malsana studento manĝis ĉiutage 250 gr. da mielo. Post du monatoj li estis denove inter siaj gekolegoj. De la inflamo, tuŝinta liajn pulmojn, restis neniuj postsignoj. Sed de tiu tago ĉe li ekĝermis la ideo detale esplori la konsiston de la mielo, ellabori metodon por ties plej efika utiligado kiel kuracilo. Liaj revoj realiĝas pli malfrue, kiam li jam kiel kuracisto gvidas la fakon « Fizioterapio » en la bansanatorio de la ministoj en urbo Kjustendil. Tie ĉi, en sia naskiĝloko, li prenas sur sin la taskon malkovri la sekreton de la abelmielo...

El Bulgario, Novembro 1964.

VERKO

Klarigu, per artikoleto en turisma broŝuro, la ĉefajn produktaĵojn de via regiono.



7. — TRADUKO : Konscienco antaŭ la tribunalo.

Sinjoro juĝisto, la leĝo, kiun vi devas apliki kaj kiu inkluzivas la obeon al la militista aŭtoritato, tiu leĝo estas kontraŭa al la etiko kaj kontraŭa al la vivo. Kion ja faru la juĝisto antaŭ la malbonaj leĝoj ?

En iu najbara lando la leĝo kondamnis siatempe al morto ĉiujn, kiuj estis naskitaj kiel judoj. Ĉu la juĝisto devis apliki ĉi tiun leĝon ? Kiam la leĝo turnas sin kontraŭ la etiko, ĝi perdas sian aŭtoritaton kaj ĝi devas esti ŝanĝita ...

Oni permesu al ni uzi ĉiujn niajn fortojn helpe al la HOMO kaj helpe al la vivo, kiel la unuaj kristanoj, kiuj rifuzis saluton al Cezaro. Ni volas obei al la aŭtoritato de la humaneca devo kaj ni rifuzas submetiĝi al la militaristoj. Oni donu al ni la eblon fari civilservon de la paco kaj pagi imposton por la paco...

Homo kaj Kosmo ; 1-1965

VERKO

Redaktu tekston de afiŝo alvokanta al agado por la paco.



8.— TRADUKO : Afiŝo por la Marsejla Kongreso

Ĉar ĝuste la lingvo-diverseco konsistigas la ĉefan obstaklon al tiu proksimigo, adopto de komuna internacia lingvo, faliginte la lingvajn barojn, faciligus la internaciajn interŝanĝojn, same bone sur la politika kampo kiel sur la komerca kaj kultura. Estas, do, dezirinde, ke la rezultoj jam akiritaj de Esperanto en tiu ĉi kampo plifortiĝu kaj disvoviĝu en la venontaj jaroj.

Mi estas konvinkita, ke la Esperanto-Kongreso en Marseille fariĝos decida etapo al tiu vojo kaj ke ĝiaj laboroj provizos per fruktodonaj instruoj la kongresanojn, al kiuj mi deziras samtempe koran bonvenon kaj agrablan restadon en nia urbo.

Gaston Defferre, *Urbestro de Marseille.*

VERKO

Faru, por propaganda folieto, mallongan raporton pri la ĉefaj vidindaĵoj de via urbo.



PAROLA PARTO

Ĝi konsistas el 2 provoj, nototaj de 0 ĝis 20. La 1-a provo dividiĝas en du partojn, kiujn oni notu do de 0 ĝis 10.

Por la unua parto oni trovos ĉi-poste konsilojn ; la dua parto konsistas en konversacio pri temo el la ordinara vivo : oni petu rakonton pri ĵus farita vojaĝo, resumon de vidita filmo, aŭ oni demandu pri la enhavo de la laŭprograme studita verko, pri la studoj kaj esperantiĝo de la kandidato ktp.

La 2-a provo devas esti tre serioze plenumata : oni elektu en ĵurnalo aŭ revuo artikolon, pri kiu fremdulo povas interesiĝi, kaj kies traduko havas ĝeneralan utilon : ekz-e artikolon pri grava okazaĵo sur la komerca, scienca, literatura kampo : invento, inaŭguro de trafikvojo, satrigo de ekspozicio, modifo de dogansistemo, eltrovo de nova kuracilo, de nova terapio, konsiloj pri higieno, dieto, edukado, aŭ instruado, morto aŭ jubileo de grandaj verkistoj ktp...

La kandidato devas sufiĉe scipovi la lingvon, por plene klarigi la esencon de la artikolo.

UNUA PROVO

Tipoj de vortlisto, ekstemporale tradukota de kandidato (ĉiu ĝuste tradukita vorto valoras 1/2 poenton ; la tuta listo valoras do 10 poentojn).

— dogano, turdo, recepto, stebi, tavolo, tablo, tabulo, tabelo, ŝargi, fuŝi
— paupière, sceller, voltiger, pétrir, gravier, tisser, pelle, seigle, orgue, mite.

— ŝargi, ŝarĝi, aŭkcie, brogi, hirta, pelvo, efekto, varbi, margĝeno
— boucher (v.) écureuil, ventouse, piston, tricoter, scie, épée, féliciter, orge, ride.

— striko, komandi, mendi, ordoni, ĝiri, pekli, felto, pelto, tajdo, ŝlimo
 — mâchoire, paon, soupape, cuir, chapiteau, écluse, tilleul, amidon, panneau, grille.

— lumbo, gaso, gazo, podio, knari, bori, pilko, retorto, ŝildo, lenso,
 — éternuer, enveloppe, punaise, laiton, pieu, cire, roue, se débatre, chanvre, seau.

— Maleolo, kapreolo, palaco, palato, impliki, banto, prujno, sibli, spiko, feĉo
 — tempe, chenille, errer, freiner, dentelle, pôle, volkan, froment, boue, truelle.

— verto, fablo, fabelo, rostro, ŝvebi, baki, kahelo, grado, eriko, kaŭri
 — lapin, chauve, tuile, platine, ascenseur, cône, puiser, saule, boiteaux, égout.

— provi, pravi, pruvi, ripo, taksi, klaĉi, bosko, stango, kruta, bukso
 — courtier, gueule, vipère, gaufre, souder, ébène, fumier, gerbe, sapin, raccommoder.

— kruta, kruda, kurioza, scivola, koverta, kovrilo, demandi, peti, grajno, greno
 — hanche, joue, sangsue, étain, fil, parquet, épine, tresser, ceinture, bretelle.

— absorbi, sorbi, insidi, inciti, instigi, volumo, volumeno, roto, lato, mato
 — natte, hanche, virer, pou, pin, âme, étincelle, suie, recruter.

ATESTO PRI KAPABLECO

SKRIBA PARTO

Ĝi konsistas el 2 provoj : traduko el esperanto, daŭranta 1 horon, kaj notota de 0 ĝis 10 ; traduko el franca lingvo, daŭranta 2 horojn, kaj notota de 0 ĝis 20. La sola helpilo permesata en la ekzameno estas la *Plena Vortaro*, kaj vortaro franca-esperanta.

La kandidatoj atentu, ke la traduko de la esperanta teksto ne devas esti laŭvorta kaj maleleganta. Oni atendas de ili bonstilan pecon, kiu, kiel eble plej, ne havu la aspekton de traduko. La ĉi-postaj tekstoj estis zorge elektitaj pro sia literatura valoro, kaj prezentas al ili taŭgan ekzercan materialon.

Ĉe la traduko de la franca teksto, ili zorgu : 1° kompreni la penson de la aŭtoro ; 2° redoni ĝin ekzakte, sed ankaŭ klare : ili evitu la francismojn, kaj penu akiri vivan, fluan kaj simplan stilon (1).

La ĉi-subaj ekzemplaj tekstoj estas intence, pro spacoŝparo, iom mallongaj. Fakte, ĉiu teksto por la ekzameno devas esti *minimume* :

- por la al-traduko (version) : 20-linia ;
- por la de-traduko (thème) : 25-linia.

(1) Aliajn tekstojn oni povos trovi en la « Manuel de Préparation à l'Atesto pri Kapableco » de André Ribot, Editions Françaises d'Espéranto »

1. SALUTO AL USONO

Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi kiel gastoj ; sed ne vidama turismo enŝipigis nin, ne la espero de ia komerca akiro pelis nin al via bordo : ni venis al vi, por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri la nova popolo eble ŝajnis al vi tro feblaj. Peco de tiu miksdevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi reale kaj vivante. Rigardu nin, aŭskultu nin, kaj konvinkiĝu, ke ni ne estas fabelo. Ni estas diversgentanoj, sed ni komprenas nin kiel samgentanoj, havante neniam bezonon humiligi aŭ fremdlingve balbutigi unu la alian. Ni esperas, ke dank' al nia laborado pli aŭ malpli frue la tuta mondo similiĝos al ni kaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj. Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos vana, sed ĝi baldaŭ eĥe resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra tuta via kontinento.

L.-L. Zamenhof
(Malferma Parolado ĉe la sesa Kongreso)

L'ATTAQUE DE LA CATHEDRAL

Tout à coup, au moment où ils se groupaient pour un dernier effort autour du bélier, chacun retenant son haleine et raidissant ses muscles afin de donner toute sa force au coup décisif, un hurlement, plus épouvantable encore que celui qui avait éclaté et expiré sous le madrier, s'éleva au milieu d'eux. Ceux qui ne criaient pas, ceux qui vivaient encore regardèrent. Deux jets de plomb fondu tombaient du haut de l'édifice au plus épais de la cohue. Cette mer d'hommes venait de s'affaisser sous le métal bouillant qui avait fait, aux deux points où il tombait, deux trous noirs et fumants dans la foule, comme ferait de l'eau chaude dans la neige. On y voyait remuer des mourants à demi calcinés et mugissant de douleur. Autour de ces jets principaux, il y avait des gouttes de cette pluie horrible qui s'éparpillent sur les assaillants et entraient dans les crânes comme des vrilles de flamme. C'était un feu pesant, qui criblait ces misérables de mille de grêlons. La clameur fut déchirante. Ils s'enfuirent pêle-mêle, jetant le madrier sur les cadavres, les plus hardis comme les plus timides, et le parvis fut vide une seconde fois.

V. Hugo (Notre-Dame de Paris).

2. LA KASTELO

La fortikaĵa loĝejo de la grandsinjoroj de Autrecourt de longe ne plu apartenis al la nobela familio. Tiu ĉi kredeble estingiĝis. Povas esti, ke la Franca Revolucio ne estis fremda al tiu estingado. Cetere, eĉ la loka kroniko ne plu mencias la grandsinjorojn. Fako estas, ke tiuj vilaĝprincoj, nomataj « de Autrecourt », malaperis. La kastelo restis. Kaj dum la sinsekvo de l' jaroj tiu domaro ŝajne neniam modifis sian eksteran aspekton ; nur apenaŭ la internan. Ankaŭ la unuaj posedantoj, sendube nobeloj neriĉaj, vivis de terkulturado. Tial la domaro konsistis plejparte el staloj, garbejoj, remizoj, kaj lasis por la loĝbezono de la mastroj nur minimuman spacon. Vasta, krudŝtona konstruaĵo, aŭ — pli precize — kvar konstruaĵoj, rektangule kunigitaj, formis kvadraton ĉirkaŭ la interna korto. La senornama fasado konservis tiun severmianan rigidecon, kiun afektas maljuniĝintaj aŭ malriĉaj nobelfraŭlinoj. Al ili, manke de junaĝaj ĉarmoj aŭ de sufiĉaj monrimedoj, restas ĝenerale nur unu ebleco por distingiĝi de la komuna popolo : la foreco.

Raymond Schwartz (Kiel akvo de l' rivero)

DE L'AUGMENTATION DES TROUPES

Une maladie nouvelle s'est répandue en Europe ; elle a saisi nos princes et leur fait entretenir un nombre désordonné de troupes. Elle a ses redoublements et elle devient nécessairement contagieuse : car sitôt qu'un Etat augmente ce qu'il appelle ses troupes, les autres, soudain, augmentent les leurs ; de façon qu'on ne gagne rien par là que la ruine commune. Chaque monarque tient sur pieds toutes les armées qu'il pourrait avoir si ses peuples étaient en danger d'être exterminés ; et on nomme paix cet état d'effort de tous contre tous.

Aussi l'Europe est-elle si ruinée, que les particuliers qui seraient dans la situation où sont les trois puissances de cette partie du monde les plus opulentes n'auraient pas de quoi vivre.

Nous sommes pauvres avec les richesses et le commerce de tout l'univers ; et bientôt, à force d'avoir des soldats, nous n'aurons plus que des soldats, et nous serons comme des Tartares.

Montesquieu,
(L'esprit des Lois, livre XIII, chap. 17).

NOTO. Arkaismoj : *désordonné* = anormal ; *redoublement* = accès.

2. LA MAŜINOJ ANSTATAŬAS LA HOMON

La juĝmaŝino faris pedantan kaj longdaŭran proceson. Ĝi petis detalajn raportojn de la akuzitoj. Poste ĝi malkuplis la esplor- kaj planmaŝinojn de la estrado de la gvidmaŝino, por ke ili donu seninflujajn atestaĵojn kaj tiel ĝi priaŭskultis ilin. Ĝi transdonigis al si mem la esplorrezultojn kaj la planojn de la gvidmaŝino, kiujn ĝi reviziigis per diversaj specialistaj sciencmaŝinoj. Poste ĝi detale kontroligis, ĉu la fabrikado de la gvidmaŝino okazis komforme al la plano aŭ ne. Kaj precipe ĝi faris kontrolprovojn, ĉu la gvidmaŝino funkcias precize laŭ la principoj, donita al ĝi de la homoj.

Tiel detala esploro memkompreneble bezonis tre longan tempon, sume 3 sekundojn kaj duonon. Fine la juĝmaŝino komunikis la verdikton : ĝi trovis neniam difekton aŭ fuŝaĵon. La gvidmaŝino agas laŭ la donitaj principoj. La proceson kontraŭ la akuzitoj ĝi ĉesigis kaj restarigis la disŝiritan kuplon inter la gvidmaŝino kaj ĝiaj subuloj.

S. Szathmàri (Maŝinmondo)

PROMENADE A BYCICLETTE

Bénin et Broudier, gardent leurs habitudes, tenaient Broudier la droite et Bénin la gauche. Lesueur s'était mis simplement à la gauche de Bénin. Ils ramonaient ainsi tout le calibre de la route. Bénin criait bien de temps à autre : « C'est dégoûtant! Vous, vous avez les ornières, vous roulez sur du velours. Et moi, je danse sur les dos d'âne » Mais au fond, il aurait été désolé de céder sa place. Il occupait le milieu du rang ; rien ne passait de Broudier à Lesueur dont il n'eût sa part ; il ne perdait pas une parole, pas un rire... Il habitait avec bonheur la région la plus riche de l'amitié.

Aussi le monde ne lui importait-il presque plus. Il voyait à peine les paysages. Il n'y donnait un coup d'œil que lorsque Broudier ou Lessueur avait dit : « Pige-moi cet horizon, si c'est bath ! ». Et il n'aurait pas été moins hereux sur le plateau d'Orléans.

Car trois copains qui s'avancent sur une ligne n'ont besoin de personne, ni de la nature, ni des dieux.

J. Romains (Les Copains, p.138)

4. ENKONDUKO AL LA TRADUKO DE HAMLETO

La tradukinto faris sian eblon por plejeble transdoni la belecon de la originalo, kreante samtempe individuan artverkon ; sed li ĉiam observis la principon, ke lia ĉefa devo estas redoni ĝis la maksimuma grado la precizan signifon, la ekzaktajn nuancojn, la tropojn, la individuan guston, la unikan karakteron de la originalo. Ĉi tie ne estas taŭga loko por polemiki pri la du skoloj ; sed la tradukinto certe devas difini sian sintenon ; kaj juĝos la leganto la gradon de lia sukceso aŭ malsukceso.

La metro de la traduko estas tiu tradicie uzata por produkti la efekton de la anglaj blankversoj : jamba pentmetro kun fina kromsilabo, kiu facile, eĉ plej ofte, estas analizebla kiel unu amfibrako sekvata de kvar trokeoj. Ĉi tiu solvo ne estas tute kontentiga ; tamen, pli bonan por ĉi tiu celo niaj versistoj ankoraŭ ne eltrovis. Eventuale provinda solvo estas kvinpieda verso, konsistanta el kvar trokeoj kaj unu pura daktilo, en kiu la daktilo povas lokiĝi ie ajn. La tradukinto ja eksperimentis per tiu metro, tradukante *Hamleton*, kaj trovis la rezulton almenaŭ interesa ; sed li opinias, ke tia metodo, kiun multaj taksus preskaŭ revolucia, ne estas permesinda en la nuna verko.

L.-N. Newell,
(Enkonduko al « Hamleto » trad. Newell).

SEMAILLES

« En avant ! » crièrent les contremaîtres ; et les six cents semeurs entrèrent en avant à travers la plaine de Roume... Dans toutes les directions de la rose des vents, les hommes s'étaient mis à marcher pas à pas en balançant le bras. Le balancement de ce bras était d'accord avec le pas. Le pied droit s'avancait, la main entrait dans le sac. Le pied gauche s'avancait, la main sortait du sac, le bras se balançait, et la poignée de graines glicait au moment où le pied gauche se posait sur la terre. Et ainsi, pied droit, pied gauche, balancement de bras, roulement des hanches et des épaules, tous ensemble, les hommes marchaient posément sur les sentiers invisibles et entrecroisés qui étaient les sentiers de semailles.

Jean Giono (Que ma joie demeure, p. 285).

5. LA RIFUĜEJO

Granda estis mia emocio ekvidante la rifuĝejon. Ĉu ili estas tie, atendente mian alvenon?... Ĉu mi trovos ĉiujn vivantajn?... Mi ekvipis mian kompatindan mulon, kiu jam estis elĉerpiĝinta, post kvarhora marŝado supren sur la kruta deklivo. La malmultajn paŝojn, kiuj mankis ankoraŭ, mi volonte traflugus, por certiĝi kaj forĵeti la terurajn dubojn, kiuj, ju pli mi ascendadis des pli ekregis mian menson. Tiam mi ekkriis la nomon de Link, per forta kriego, sed ĝi glaciigis en la aero, forportota de la vento. Fine mi saltis desur la mulo, trakuris la restantan spacon, kaj malfermis la pordon de la rifuĝejo. Terura sento ekregis min. La dometo estis malplena, tia, kia ni estis lasintaj ĝin antaŭ pluraj tagoj, kun la diferenco, ke nun la planko kaj ĉiuj aliaj aĵoj estis kovritaj per maldika tavolo de delikataj neĝeroj, kiuj estis enfiltriĝintaj tra la fendaĵetoj dum la ŝtormo.

Tibor Sekelj (Tempesto super Akonkagvo, p. 192).

L'AUBE SUR CARTHAGE

Une barre lumineuse s'éleva du côté de l'Orient ; à gauche, tout en bas, les canaux de Mégara commençaient à rayer de leurs sinuosités blanches les verdure des jardins. Les toits coniques des temples heptagones, les escaliers, les terrasses, les remparts, peu à peu, se découpèrent sur la pâleur de l'aube, et tout autour de la péninsule carthaginoise une ceinture d'écume blanche oscillait, tandis que la mer, couleur d'émeraude, semblait comme figée dans la fraîcheur du matin. Puis, à mesure que le ciel rose allait s'élargissant, les hautes maisons inclinées sur les pentes du terrain se haussaient, se tassaient, telles qu'un troupeau de chèvres noires qui descend des montagnes. Les rues désertes s'allongeaient ; les palmiers, ça et là sortant des murs, ne bougeaient pas ; les citernes remplies avaient l'air de boucliers d'argent perdus dans les cours ; le phare du promontoire Hermaeum commençait à pâlir. Tout en haut de l'Acropole, dans le bois de cyprès, les chevaux d'Eschmoûn, sentant venir la lumière, posaient leurs sabots sur le parapet de marbre et hennissaient du côté du soleil.

G. Falubert (Salammbô, I).

6. LA KRUCOJ DE L'ESPERO

Denove mi devas plandumigi miajn ŝuojn. La maldekstra sorbas akvon kiel vorema molusko kaj la dekstra tutcerte ne povus esti eksponata malantaŭ butika montrofenestro, same ne pro sia aĝo kiel pro iom ĝena eksmodeco. Sed la ŝuoj devos ankoraŭ pacienci iom, almenaŭ ĝis la komenco de julio, kiam mi ricevos mian monatan salajron — kiel oni diras — tro altan por morti kaj tro malaltan por vivi. Ĝi ja sufiĉas por esperi. Esperu... En mia lando espero estas profesio. Oni esperas amase, opule, individue kaj kolektive, en oficejo kaj hejme, manĝante kaj endorme, ĉiun semajnon pli kaj pli. Oni rutiniĝis, oni fariĝis profesia esperantulo. Mi aŭdis pri homoj, kiuj nomas sin esperantistoj kaj ankaŭ esperas. Mi eĉ miras, ke ili estas tiom malmultaj, precipe en mia lando, kie esperado estas ja, se ne devo oficiala, almenaŭ forta kutimo. Ne demandu, kio mi estas. Ĉu tio entute gravas ? Egalas ja, mi povas esti gimnazia profesoro, purigistino aŭ geometro. Sole por decpostulo mi diras, ke mia eksterespera okupo konsistas el plenigado de rubrikoj per unu, du, tri ĝis naŭ ciferoj plektitaj per nuloj.

Jerzy Grum (33 Rakontoj, eld. Stafeto, p. 271).

FOLIE DE NERON

La manie furieuse de Néron était arrivé à son paroxisme. C'était la plus horrible aventure que le monde eût jamais connue. L'absolue nécessité des temps avait tout livré à un seul, à l'héritier du grand nom légendaire de César. Un autre régime était impossible, et les provinces, d'ordinaire, se trouvaient assez bien de celui-ci ; mais il recélait un immense danger. Quand le César perdait l'esprit, quand toutes les artères de sa pauvre tête, troublée par un pouvoir inouï, éclataient en même temps, alors c'étaient des folies sans nom. On était livré à un monstre. Nul moyen de le chasser ; sa garde, composée de Germains, qui avaient tout à perdre s'il tombait, s'acharnait autour de lui ; la bête acculé se baugeait et se défendait avec rage. Pour Néron, ce fut quelque chose à la fois d'épouvantable et de grotesque, de grandiose et d'absurde. Comme le César était fort lettré, sa folie fut principalement littéraire.

7. LA KAROTOJ

Ho ! tiuj karotoj, karmezinaj, molaj, sukeraj, kies dolĉa suko gutadis el mia festa buŝo, kiujn mi longe maĉadis kaj frandis ĝis krakrompo de mia subventra rimeno ! Ili donis al mi tiun brilrufan hararon, tiun fajran rigardon, tiun altfieran mienon, kiuj senprudentigis tiom da junaj azeninoj. Mi malgaje konfesas, ke mi nun pli taŭge similas al birdtimigilo ol al donĵuano : mia dekstra orelo ĉifone balanciĝas super miaj mukecaj nazkavoj, la alia estas punte tinetrua ; hieraŭ mi sputis mian lastan molaron, kaj mi malrekte funkcias pro reŭmatismo. Sed tion ne dubu, amiko, en tiu epoko mi furoris kaj ne nombris miajn amsukcesojn.

Kun la infano surdorse, sekvate de la fidela kavaleriano en blanka turbano kaj ruĝa burnuso, mi agrable vagadis tra la palmaro, tra la stratoj de la urbeto, por gajni favorojn kaj karotojn. Ni kune vizitis la amikojn de mia eta princo, kiuj min manflatis, dorlotis, eĉ kisis sur la frunto.

J. Ribillard,
(Preĝo de M'Saud, 33 Rakontoj, Stafetoj eld.)

LE CYCLOPE

Le lendemain, le Cyclope fut tiré de ses rêves par des attouchements à son visage et à ses épaules nues, et il sourit, car souvent l'Aurore jouait à le caresser de ses doigts. Il entrouvrit son oeil, et soudain ne put l'en croire, car c'étaient les pieds nus des compagnons d'Ulysse qui foulaient sans respect son corps, y laissant une minute leurs empreintes. La caverne, d'ailleurs, était au pillage. Les Grecs bivaient vin et lait à même l'outre et à même les pis. De vieux fourriers barbus chevauchaient les beliers, et engageaient des courses, comptant au sablier le tour de grotte le plus rapide ; et, comme le Cyclope poussait un premier rugissement, puis un second, aucun ne daigna l'entendre. Le géant en fut stupéfait : « O toi, cria-t-il, chef de cette bande ! D'où vient que tu m'insultes en mon propre logis? »

Jean Giraudoux (Elpénor).

8. LIAJ KVAR EDZINOJ

Lia unua edzino mortis tro juna, estis bona kuzino lia. La dua, bela orfino, plaĉis al li, sed lia patro — tirano en la hejmo — laŭ kiu bravuloj devas sin amuzi per « profesiaj inoj », forpelis ŝin, ĉar al ŝi unu viro sendis amleterojn, kvankam ŝi plorĵuris, ke ŝi tute ne konas lin. La tria estis kriple malbela filino de bienulo, kaj nur tro malrapide laboris. — En ĉio ŝi ne taŭgis kiel edzino de malriĉa salajrulo, sed ĉar ŝi havis varman koron kaj, malsame al la du antaŭaj, naskis infanon, li neniam intencis apartiĝi de ŝi. Malgraŭ tio, en la nokto de la enterigo de lia patro oni decidis eksedzinigon je l' nomo de la parencaro. La infano, ina, post kelke da monatoj « feliĉe » mortis en malmolaj brakoj de lia patrino. Nagaj ne volis plu edziĝi, tamen oni tion ne permesis. La kvara estas la nuna, kiu certe estos la lasta. Ŝi, 20 jarojn pli juna ol li, naskiĝis en familio de tinkturisto kaj iam kunvivis kun legomvendisto. Ties komerco malsukcesis, ĉar oni fondis urban vendejon proksime.

Hasegaŭa Teru

(Ses monatoj, el Japana Kvodlibeto, Stafeto).

UN ÉTÉ A LA CAMPAGNE

Il ne faut pas croire que les autres « touristes » s'agitaient beaucoup plus que nous. Les gens de mon âge se souviennent qu'un été à la campagne, vers 1897, ne ressemblait pas aux villégiatures mouvementées d'aujourd'hui. Un ruisseau froid, pur et ardoisé, servait de but de promenade aux plus remuants, qui emportaient des pliants, un ouvrage d'aiguille, un roman, le goûter, d'inutiles cannes à pêche. Par les soirées de pleine lune, après le dîner qui sonnait à sept heures, des jeunes filles et des jeunes gens s'éloignaient en bandes sur la route, revenaient, s'arrêtaient, se souhaitaient le bonsoir. Des familles aventureuses pratiquaient ce qu'on appelait « la baignade », se trempaient l'après-midi dans la rivière élargie à une petite lieue du village. Le soir, autour de la table d'hôte, les cheveux mouillés, des enfants sentaient l'étang et la menthe sauvage.

Colette (Le képi).

PAROLA PARTO

Ĝi konsistas el 3 provoj, nototaj de 0 ĝis 10. La 2-a kaj 3-a dividiĝas en du partojn, kiujn oni notu do de 0 ĝis 5. Ne estas bezone doni ekzemplojn pri la legado de klasikaĵo (2-a provo : Zamenhof, Baghy, Rosbach, Rossetti, Schwartz, Ribillard, Boulton, k.m.a), nek pri la rakonto de anekdoto (3-a provo) : oni tamen sciu, ke ĉe manko de materialo, oni povas anstataŭgi la rakonton de anekdoto per resumo de la laŭprograme studita klasika verko.

La Ekzamenontoj por la Parola parto de la «Atesto pri Kapableco » bonvolu atenti pri la jeno :

— Ili strikte observu la regulojn de « Règlement et programme des Examens » : ekz. ĉu la gramatika parto estis komplete pritraktita, klare esprimita por la eventualaj lernantoj, kaj en bona lingvo, kun uzo de la nigra tabulo, ktp. Se eble, la 1-a punkto de la parola parto okazu antaŭ publiko.

— La punkto 3 celas demandojn pri 10 vortoj (el esperanto) kaj 10 vortoj (el la franca) el *ĉiuj* eblaj oficialaj radikoj (Universala Vortaro kaj oficialaj aldonoj).

— Krome, la ekzamenantoj aldonu al la poentolisto raporteton kun motivigo de la poentoj, ĉefe pri la gramatika parto.

UNUA PROVO

Tipoj de gramatika demando, klarigota de la kandidato tiel, kiel li ĝin klarigus en unuagrada kurso.

1. Predikativo : *de la subjekto, de la objekto.*
2. Akuzativo : *difino, utileco, uzado (gramatika funkcio : anstataŭo de prepozicio — konkreta funkcio : esprimilo de movo). Nominativo kaj akuzativo post KIEL.*
3. Kvalifikaj adjektivoj : *genro, nombro, kazo ; adverba formo ; komparacio.*
4. Numeraloj : *bazaj, vicmontraj, frakciaj, poaj ; esprimo de aĝo, horo dato.*
5. Personaloj kaj posesivoj : *Uzado de Ĝi, de SI, de SIA ; Traduko de LE, LEUR, EN, Y, OU.*
6. Tabelvortoj. *TIU kaj TIA; KIU kaj KIA ; IU kaj IA ; korelativoj ; KIES. Traduko de DONT.*
7. Indefinitoj. *Traduko de QUELCONQUE, AUTRE, TEL, TOUT, MEME, QUELQUE.*
8. Konjugacio. *Komparo kun la franca konjugacio. Helpverboj; personoj, nombroj, tempoj, modoj ; aktivo kaj pasivo ; simplaj kaj kompleksaj tempoj ; ATA kaj ITA.*
9. Diversaj specoj de verboj : *transitivaj, netransitivaj, absolutaj ; francaj reflektivaj verboj (4 specioj) ; senpersonaj verboj.*
10. Uzado de indikativo. *Komparo kun la franca. Uzado post verboj esprimantaj aserton, senton, dubon. Propozicioj koncedaj, relativaj. Verbotempoj en subpropozicioj (dependaj, demandaj, nereкта parolo).*

11. Uzado de kondicionalo kaj volitivo. *Kondiĉaj aŭ supozaj subpropozicioj ; esprimo de ebleco kaj neebleco. Traduko de la franca « subjonctif », « impératif ».*

12. Uzado de infinitivo. *Infinitivo subjekta, objekta, adjekta. Traduko de la franca infinitiva propozicio. Prepozicio, kiuj povas antaŭi infinitivon. Traduko de SANS, APRES plus infinitivo. Traduko de infinitivo post VOIR, ENTENDRE.*

13. Uzado de participo. *Riĉeco de Esp.-o je participoj. ATA kaj ITA. Participoj adjektivoj, substantivoj, adverboj. Franca absoluta participo.*

14. Adverboj. *Difino, finaĵoj. PLU kaj PLI, ĴUS kaj TUJ, PLI FRUE kaj PREFERE, TUTE NE kaj NE TUTE, JAM kaj ANKORAŬ. Suplemento de la adverboj.*

15. Demando kaj negado. *Demando en ĉef- aŭ aŭ subpropozicioj. Traduko de SI. Duobla, nenecesa negacio. Traduko de NE PLUS, NON PLUS.*

16. Prepozicioj. *Nominativo kaj akuzativo. Uzado de DA, DE, EKSTER, EL, KROM, KUN, PER, PO, POR, PRETER, PRI, PRO, SUPER, SUR, TRA, TRANS. Traduko de A, AVEC, DANS, DE, PAR, POUR, SUR.*

17. Afiksoj. *Listo, signifo. Verboj kun IGI kaj IĜI. Uzado de AD, AĴ, EBL, EC, EM, IND, ISM, IST, UJ, UM, MAL, MIS, RE.*

18. Vortkunmeto. *Principo de neceso kaj sufiĉo. Ordo de la elementoj. Analizo de « aŭto-aer-bremso », de « vaporŝip-asocio », de « interakto », de « dispecigi ».*

DUA PROVO

Tipoj de erara tasko de lernanto, parole korektota de la kandidato.

I

- 1.— La kurso komencos mardo la 27-a de Oktobro.
- 2.— La bruo estis jen plifortiĝita, jen mildiginta, kaj fine li ĉesiĝis.
- 3.— Mi ne sciis se li venus.
- 4.— Mi bedaŭras, ke li estu veninta, ĉar li estas kolera, kaj estigas disputoj.
- 5.— Dum ke la hundo manĝis la oston, venis al li pli grandan hundon kun minaca mino.
- 6.— La Foiro presigas kartojn Esperante redaktitaj, kies la teksto estas tute korekta.
- 7.— Mi absorbis plenan botelon de vinon.
- 8.— La simila sorto trafis la maljunan palacon de la reĝo, staranta sur la loko de nuna preĝejo.
- 9.— La kulturataj homoj havas tendencon konsideri Esperanton kiel infana afero.
- 10.— La saĝaj homoj konservas iliajn amikojn, la malsaĝaj perdas la iliaj.

II

- 1.— Veni ĉi tien, ĝis la pordon !
- 2.— La tuta nokto, la neĝo faladis sur la tero, kaj kovrigis ĉion.
- 3.— La ĉevalo subite haltis sin : siaj rimenoj estis rompiĝitaj.
- 4.— Kritiki estas facila, fari malfacila.
- 5.— Donu al mi iomete plu da tiu bonega kafo !
- 6.— Apenaŭ li ricevis tiu letero, ke li sendis la respondon

- 7.— Ĉiu rajtas iri en la vivon, la okuloj fermitaj, kaj atendanta ĉielajn benojn.
- 8.— Ŝi estas pli zorgema, ol sia fratino.
- 9.— Por stacion République, sekvu ĉiam la koridoron.
- 10.— Unu generalo petis unu soldaton, se la supo estis bona.

III

- 1.— Mi amas mian edzinon, pli ol mia kuzino.
- 2.— Mia nomo estas konita al la korto.
- 3.— Ĝi ne estis ke vi, kiu estu kapabla ĉi tiun bonan verkon (bonne œuvre)
- 4.— La bildo de la kriminalo estis afiŝata sur sia propra pordo.
- 5.— Kion li fariĝas? Mi vidas lin malpli ol neniam.
- 6.— Li vendis al mi ĉi tiun buston po mil frankoj.
- 7.— Vi certe ne amas min, des pli ke vi neniam venas ĉe mi.
- 8.— La viro, kies ni parolis, tuj alvenis ĉi tie.
- 9.— La binokloj proksimigas la objektojn de nia okuloj.
- 10.— La tranĉilo estas se malbona, ke ĝi ne tondas butero.

TRIA PROVO

(La kandidatoj por A. pri K. devus koni ĉiujn oficialajn radikojn.)

Tipoj de vortlisto, ektemporale tradukota de kandidato. (Ĉiu ĝuste tradukita vorto valoras 1/4 poenton, la tuta listo valoras do 5 poentojn.)

1. akselo, didelfo, grumbli, varti, juro, lekcio, rismo, ulmo, buko, buklo, — moelle, taon, pain azyne, brandir, poix, récif, tonnelle, primevère, pervenche .

2. pelvo, polvo, pulvo, pulvero, pulvoro, pudro, pipso, fetora, ignori, roto — aine, caille, gruau, chanoine, jaillir, étape, archet, clarinette, aubépine, thym.

3. felpo, felto, pelto, felo, haŭto, kirli, mopso, tegi, stipendio, partituro, — démangeaison, chantre, héron, bac, quille (jeu), quille (bateau), basson, espalier, fève, œillet.

4. frondo, fronto, frunto, frontono, ŝveli, flagri, rosmaro, kvasto, turbo, skolo — musc, blaireau, étrangler, palette, érable, houx, pissenlit, champignon, sacrifier, pamphlet.

5. plato, plado, pleto, pledo, ŝamo, ĉamo, noktuo, lapiso, patrono, lucerno — momie, bercer, déluge, hérisson, suif, gland, hêtre, fougère, martre, marée.

6. fagoto, galo, skabio, furoro, pudelo, pedelo, gento, gubernio, termino, lolo — glousser, emmailloter, traité, parchemin, virgule, houblon, panais, mouette, échecs, feuilleton.

7. pavo, papavo, papago, pavimo, stumpo, nizo, tramo, sukceso, navo, plago — articulation, lamproie, bouffant, jumeau, encens, cachot, losange, mélèze, serf, pivoine.

8. fondo, fono, fundo, fando, fonto, fendo, funto, fontano, lieno, krabro — geai, pontife, amadou, étatmajor, joufflu, sureau, noyau, chatouiller, vernis, pain, à cacheter.

9. konferenco, prelego, atlaso, brogi, verdigro, banto, galo, ĉifi, kaĉo, rabio — grouiller, écume, étain, havresac, flèche, orme, clapet, tournoi, bleuet, rade.

10. medolo, mielo, mjelo, svati, ŝovi, kringo, futo, gurdo, tafto, gipso — suie, trio, pinson, bêcher, suer, vis, radeau, étriller, verveine, entonnoir.

PEDAGOGIA ATESTO

SKRIBA PARTO

La skriba parto konsistas en unu disertacio, ĉirkaŭ 60-linia, pri la enhavo aŭ signifo de unu el la verkoj ĉiujare indikitaj en la organoj de ambaŭ asocioj.

Jen ekzemploj de temoj pri la verkoj, kiuj estis studotaj en la pasintaj (1963-1965) jaroj.

(pri « MALSATA ŜTONO ») — a) Ĉu oni povas paroli pri poezio en la prozo de Tagore ? — b) Priskribo de la Bengala socio ĉe Tagore.

(pri « OTELO ») — a) Dramo de ĵaluzeco en Otelo. — b) Ĉu la rasismo ludas rolon en la agado de « Otelo » ?

(pri « LETEROJ DE ZAMENHOF ») — a) Rilato inter la lingvo kaj la ideologio de Z. — b) La medio de la unuaj francaj esperantistoj.

(pri « KREDU MIN, SINJORINO ») — La stilo de Cesare Rossetti ; lia ebla influo sur la ĉiutagan lingvon de la esp-istoj.

(pri « VOJAĜO AL KAZOHINIO ») — a) Ĉu la « Vojaĝo » estas romano de sciencfikcio aŭ filozofia romano ? — b) Kiaj estas la intencoj de Szathmàri en la 2-a parto de la « Vojaĝo » ?

(pri « HOMOJ KAJ RIVEROJ ») — Komparo inter la heroo de la 1-a novelo kaj la kontraŭhitlera rezistanto (Bravulino, kaj : Bildo rompiĝis).

Tri horoj por tiu provo kun sola helpilo : Plena Vortaro.

PAROLA PARTO

Duonhora leciono, en Esperanto aŭ en franca lingvo, kia ĝi devus okazi en kurso, pri grava punkto gramatika. Duonhora antaŭpreparo kun sole la Plena Vortaro. Poste kvaronhora demandado pri la sama aŭ aliaj punktoj de la gramatiko.

Dua provo : kvaronhora prezentado de punkto de la historio de Esp-o post kvaronhora preparado.

Pri la unua provo de la parola parto, oni atentigas, ke temas pri la leciono farata antaŭ publiko el, eble ŝajnaj, sed prefere efektivaj, lernantoj de duagrada kurso. La leciono devas esti sufiĉe kompleta kaj klare prezentata.

DIPLOMO pri ALTAJ ESPERANTAJ STUDIOJ

EKZEMPLOJ por la Diversaj Partoj
de la EKZAMENO

SKRIBA PARTO

Traduko el Esperanto

CEZARO SUBPREMAS LA RIBELON DE LA ALEKSANDRIANOJ

... Ili batalis tage-nokte kaj nur de sekundo al sekundo oni povis fari decidojn pri ĉiu sekva ago kaj intenco. Jes, tio estis terura inkubo el brulego, sango, fero kaj mortkonvulsiaj korpoj, el kiu oni povis vekiĝi nur por eterna endormiĝo...

Intertempe tamen horoj plenaj de ekstazo, destinataj nur al la mortkondamnitaj : ĝisfundi la plezuron, ĉar eble lastfoje ; tute droni en spirraban kirliĝon de pasioj ; forfrenezumi en amluktadon la furiozon de l' batalo por — denove tien rapidi kun lipoj malsekaj de kisoj kaj sangaj de enmordoj ; diskonsumi sian vivon kiel tiu, kiu, elsaldinte la kalkulon, malŝpare disŝutas la reston.

Kaj kiam ĉiuj estis jam pleje mortpretaj, ekbrulis la suno de Pelusio : la venko, donacita al senesperuloj kiel amnestio, la venko, antaŭ kiu ili staris konsternite, la fulmo, alportanta savon kaj dishakanta ĉiun reziston, kvazaŭ trafitan arbon.

La dioj de l' lando ne favoris siajn filojn : la giganta armeo, al kiu oni taskis pereigi Cezaron kun lia trupeto, jam kuŝas en la larĝa rivero, malvigle rulanta siajn ŝlimajn ondojn al la maro. La armeon kaptakiris la profundo kaj ĝiaj loĝantoj, la naŭzaj lacertegoj, kiujn la Egiptoj kultas sanktaj : dum semajnoj ili grasige sin regalos per la korpoj de siaj adorintoj. Se la venkinto nun volus juĝi la ekribelintan urbon, ja eĉ se li propramane submetus la fajron cindrigante Aklesandrion kune kun ĝia fiero : la sepdek du militŝipoj — neniu povus lin malhelpi. La Pelusia tago rompis la spinon de Egiptujo.

M. Jeluŝic. « Cezaro » trad. Ivo Rotkviĉ

Traduko en Esperanton

LA PRECISION DANS L'ART

Bien que le Poussin ne soit plus, aux yeux de l'art contemporain, un modèle en tout parfait, personne ne lui refusera la science de la composition. Or cette science, fruit de longues méditations et d'un génie grave qui ne prend pas la peinture comme un simple jeu de couleurs, consiste visiblement à élaguer d'une claire conception tout ce qui risquerait de la troubler, ce qui est oiseux ou indifférent, tout ce qui pourrait égarer les yeux et les distraire du sujet. Tout est sacrifié à l'unité des impressions. Il suffit de rappeler ici certains tableaux bien connus qui sont au Louvre, Les Bergers d'Arcadie, Le Jugement de Salomon, Eliézer et Rébecca.

Dans ce dernier tableau on peut saisir dans toute sa simplicité cet art d'une si sévère grâce. Pendant qu'à la fontaine Eliézer offre au nom de son maître des bijoux à Rebecca, cinq ou six jeunes filles, venues pour chercher de l'eau, regardent la scène en sourient. Un mariage fait toujours sourire, surtout quand on le devine. A l'extrémité du tableau se trouve un personnage qu'on dirait d'abord inutile, puisqu'il ne peut voir ce qui se passe. C'est une fillette d'un âge non encore curieux de mystères, à genoux devant un vase trop plein que continue pourtant à remplir, d'un mouvement distrait, une grande campagne trop occupée de la scène principal. La fillette regarde en l'air, fort étonnée de cette distraction et en rit, si bien que même en tombant sur ce personnage accessoire, les yeux du spectateur sont ramenés au centre ; ils vont sûrement de la surprise rieuse de cette enfant à l'étourderie de la grande distraite, de son étourderie à sa curiosité, laquelle est suspendue à l'offre des bijoux. Toutes les lignes, tous les fils de la pensée aboutissent à ce nœud. Et cependant, dans tout le tableau, il n'y a rien de géométrique ; on n'y trouve de la géométrie que la clarté et la rigueur.

C. Marthe (1880).

Vortaro

Du artikoloj, unu franca-esperanto, la alia esperanto-esperanto

En ambaŭ kazoj, oni devas doni 1^o difinon kiel eble plej ekzaktan pri la senco aŭ sencoj de la koncerna vorto (en esperanto por la 1-a, same kiel por la 2-a) ; 2^o liston kiel eble plej kompletan de la esprimoj (en la 1-a kazo) aŭ de la derivaĵoj aŭ kunmetaĵoj (en la 2-a kazo) kun la responda traduko.

1. Rédigez, tel qu'il devrait l'être pour un dictionnaire Français-Espéranto véritablement complet, l'article: *COUP*.

Ekzemplo por la vorto *coup*:

COUP

I. Movo per kiu aĵo abrupte kolizias kun alia aĵo

se donner un coup contre un meuble, coups de bâton, de fouet, d'épée, poignard (sans coup férir, coup de Jarnac)

(f) un coup de patte, de bec, de langue, pied, un coup de canon, de fusil, fusil à 6 coups, faire coup double, porter un coup droit à quelqu'un.

II. Subita ago de natura elemento.

un coup de foudre, de vent, de mer, de soleil, de tonnerre

(f) les coups du sort, tomber sous le coup d' une accusation, faire un sale coup, être sous le coup de ...

III. *Ĉiu movo per kiu organo aŭ instrumento funkcias*

s'envoler d'un coup d'aile, ne pas perdre un coup de dent, un coup d'œil, donner un coup de main, d'épaule, un coup de chapeau, un coup de peigne, de brosse, de balai, de lime, de rabot, de ciseaux, de pinceau, traduire à coups de dictionnaire, un coup de filet, de cloche, de sifflet.

IV. *Ĉiu el la agoj aŭ manovroj de ludanto*

gagner à tous coups, un beau coup de dés, aux échecs, un course de bourse.

(f) un coup de maître, d'éclat, de théâtre, d'état.

V. *Ĉiu el la streĉoj, penoj, kiujn oni faras por elfini ion*

réussir du premier coup, boire un verre d'un seul coup, boire un coup (p. et f.), boire le coup de l'étrier, encore un coup, pour le coup, tout à coup, tout d'un coup, coup sur coup, après coup, à coup sûr, un coup monté, ktp., ktp., ktp.

2. Rédigez, tel qu'il devrait l'être pour un dictionnaire Français-Espéranto véritablement complet, l'article: *FALI*. en utilisant entre autres les exemples suivants :

la suno jam -as ; sur min ĉio -is ; li -is de glavo ; -i en la okulojn ; la -o de ŝiaj esperoj ; tiu popolo havas koron de -eman kaj neobeeman ; tiuj fortoj devis senforte -i sub la malamika potenco de la malkapableco ; enintaj vangoj.

Alia ekzemploj : jour ; prem-, hom- ; ktp., ktp.

Franca gramatiko kaj sintakso, kaj studa kritiko de franca teksto rilate lingvon kaj stilon.

RONCARD, Amours de Marie II, 4 (« Comme on voit sur la branche... ») Montrer que la douleur du poète s'exprime que d'une façon indirecte, par l'image, le rythme, les sonorités, etc., et précisez les moyens par lesquels Ronsard a en quelque sorte estompé le caractère funèbre du sujet pour ne laisser dans la mémoire qu'une impression de grâce exquise.

BAUDELAIRE, Recueillement (Les Fleurs du Mal) « Sois sage, ô ma douleur... » Vous supposerez qu'un Espérantiste étranger veuille traduire ce poème, et vous demande : 1° de lui en expliquer très exactement le sens particulier (plaisir-bourreau ? remords-fête? servile ? balcons du ciel ? surannées ? arche ?) et général (Que veut exprimer le poète ? Dans quelle situation doit on l'imaginer quand il compose ceci ? En quoi ceci est-il très significatif des sentiments du poète ?) 2° de lui montrer quelles sont les beautés particulières du sonnet, qu'il faudrait essayer à tout prix de rendre dans une traduction (mots rares, images — de quelle origine ? — rimes, rejet, rythme, etc.)

PAROLA PARTO

KLASIKA VERKO - Hamleto, ekstemporala traduko, sen antaŭa preparo, de donita eltiro.

PRELEGETO - Temoj : Estonteco de Esperanto - Kiel revivigi la movadon en Francujo? - La nunaj antaŭjuĝoj pri esperanto, kiel refuti ilin ? La esperantista « faŭno ».

HISTORIO de la MOVADO - Temoj : Origino kaj praorigino de Esperanto - Historio de U.E.A., deveno, fondiĝo ktp- S.A.T., origino, historio, tendencoj, celoj. La hungara kaj skota skoloj en literaturo.

LECIONO - : Temoj : La U-modo - La particip-adverboj - Esprimo de la komparo en esperanto : diferencoj disde la franca lingvo, utilo de la akuzativo ktp - La tabelvortoj : rimedoj mnemonikaj aŭ etimologiaj por instrui ilin, pravigo de la ekzisto de tia tabelo en artefarita lingvo.

EKZEMPLO DE TEKSTO KOREKTOTA :

Bertie jam estis dekokjara fraŭlino ; ŝi elektis vestaĵojn sufiĉe brilaj por cirka dancistino. Paĉjo konfesis al si, ke li estis iom embarasita de tiu grandioza juna papilio, kiun li helpis elkovi. La onklino Emma diris, ke la knabino rajtis petoli, kaj Paĉjo pagis la koston, sed li tenis sin solide kiel Gibraltar kontraŭ la penado de Bertie puŝi lin en ŝian socian turniĝon. Tian saman teniĝon alprenis Bunny, kiu ĝin trovis sprita, sekve lia fratino mokridis. Kompreneble, dekokjara fraŭlino apenaŭ konscias, ke ekzistus deksesjara bubo, sed la riĉaj amikoj de Bertie havis pli junajn gefratojn, kaj ŝi volis, ke Bunny deskrapu la petrolon de sub siaj ungoj, kaj eniri en la laŭmodan medion kaj ricevi knabinon pli indan ol Rosie Taintor. Bunny provis tion dum kelka tempo kaj li devis konfesi, ke tiuj riĉegaj junuloj ne interesis lin ; li ne povis vidi, ke ili ion sciis, nek diveni, kion ili fariĝus en la vivo.

Por la preparado de tiu plej alta ekzameno, ekzistas broŝureto indikanta la plej studindajn aŭ konsultindajn verkojn en Esperanto kaj en franca lingvo : «Konsiloj kaj Tekstoj»

TABELO DE ENHAVO

Antaŭparolo	2
Atesto pri Lernado	3
Atesto pri Supera Lernado	6
Atesto pri Kapableco	15
Pedagogia Atesto	39
Diplomo pri Altaj Esperantaj Studoj	41

Kolekto de Franca Esperanto-Instituto

UNUA SERIO : PEDAGOGIA

1. Unuagrada Kurso per Korespondado, *de M. Rameau kaj G. Waringhien, elĉerpita.*
2. Facilaj Esperantoj Legaĵoj, *kompilitaj de G. Waringhien, elĉerpita.*
3. Gvidlibro por la ekzamenoj de F.E.I., kompletigita kaj ĝisdatigita, 2-a eldono.
4. Duagrada Kurso por Korespondo, *de M. Rameau kaj G. Waringhien, elĉerpita.*
5. Traduko de la provtekstoj en la Gvidlibro, *de G. Waringhien, elĉerpita.*
6. Poŝvortareto, *de L. Bastien.*
7. Rekmetoda Ilustrita Kurso, *de F. Szilagyi kaj G. Waringhien, elĉerpita.*
8. A.B.C. d'Espéranto, à l'usage de ceux qui aiment les lettres, *par G. Waringhien, reeldonota.*
9. Ne kiel Meier !, *de Raymond Schwartz.*

DUA SERIO : BELETRA

1. Polusaj Glacioj sub noktomeza suno, *de Joël Thézard, ilustrita per 30 bildoj.*
2. La Bela Historio de Jozef, *de L.L. Zamenhof, ilustrita per 30 bildoj.*
3. Sen Eliro kaj La Respektama P..., *de Jean-Paul Sartre, traduko de Roger Bernard.*

MENDI ĈE :

U.E.F., 34, rue de Chabrol, Paris (10^{me})

S.A.T.-Amikaro, 67, Av. Gambetta, Paris (20^{em})